



Decembro

2024

Esperanto-Infomilo



Foto novembro 2024, sendita de U. Fellman: Moskeo en plej suda urbeto de Frankfurto. "Mi trovis ne nur interesajn modernajn, novklasikajn, kaj mezepokajn konstruaĵojn, sed ankaŭ moskeon kun minaretoj, kiu jam ekzistas tie ekde 1959."

Mesaĝo de la prezidanto:

La imamo Paul-Gerhard "Hadayatullah" Hübsch ne estis naskita en Frankfurto kiel Goethe, sed same kiel Goethe en sia *Okcident-orienta divano* li varbis por la kuneco de oriento kaj okcidento: "Ĉi tiu vivo en la oriento de nia tero kun sia saĝeco, ĉi tiu hektika okcidento kun sia gapa, ebria buŝo, kiel tiuj hemisferoj kunligas unu kun la alia, kiel ili penetras unu la alian por kuniĝi en mesia epoko."

La lirika memo de Goethe aliras persan poezion kun egaleco kaj rigardas ĝin kiel egalulon:

"Kiu konas sin kaj aliajn
Ankaŭ rekonos ĉi tie:
Oriento kaj Okcidento
Ili ne plu povas esti apartigitaj. "

Amuzan legadon,
G. Hennemann, 1-an de decembro 2024

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Pri Zamenhoftago
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Unua mardo

La 3-an de decembro 2024

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Sabato, la 14-an de decembro, posttagmeze 2pm

Zamenhof-solenaĵo en la urbocentro

Treffpunkt/Renkotejo:

Frankfurt am Main, Wiesenhüttenplatz, 11:45 MET

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 17. Dezember, 2024

19:00 h
Weihnachtsfeier *

Mardon, la 17-an de decembro, 2024

19:00 h
Kristnaska kunveno*

Alle

Ĉiuj

*Bonvolu prepari kaj kunporti ion por trinki, manĝi kaj por dekoracii nian salonon.


Bildfonto kapaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

[https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape Frankfurt 2021 Panorama.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg)

Anoncoj:

- 14.12.24 11:45 Solenaĵo okaze de Zamenhof-Tago sur la placo Wiesenhüttenplatz, kiu situas tre proksime al la frankfurtmajna ĉefstacidomo, detajlojn vi trovos sub la rubriko “Pri Zamenhoftago”.
- 17.12.24 19:00 Kristnaska kunveno en Saalbau MÜZ



Eseo de G. Hennemann

En la okuloj de kredantaj islamanoj, la Korano estas konsiderata la vera miraklo de Islamo. Iun nokton, la analfabeto Mohamedo laŭdire akceptis ĝin en sian koron, el la ĉielo, en nur unu momento. Pli malpli en sama maniero la konvertito Paul-Gerhard Hübsch el Frankfurto ricevis sian revelacion, kiam li aŭtovojaĝis tra Maroko: Hübsch iris longan vojon antaŭ li trovis sian destinon en Islamo. Mi citas el sia autobiografio:

“Mi pensis, ke mi faris ĉion malbone en mia vivo kaj estis malespera, sen espero, ke la aferoj iam pliboniĝos. Mi nun havis 23 jarojn kaj trairis ĉiujn ĉielojn kaj inferojn de la monda vivo kaj ĝiaj artefaritaj paradizoj. Subite mi ne plu vidis ŝancon, ke aferoj pliboniĝos. La nura espero al mi restis uzi LSD-on kaj tiel atingi novan klarecon kaj trarompon en novajn sferojn. Sed kiam ni veturis tra Maroko per aŭtomobilo, ĉio simple plimalboniĝis. Mi subite sentis, ke dikaj, abomenaj serpentoj estas en mi. Estis terura vizio. Mi sentis min peka kaj kulpa. Mi estis tute malespera, ne estis elirejo. En ĉi tiu situacio, mi komencis deŝiri miajn vestaĵojn. Mi petis mian amikon haltigi la aŭton. Mi nur volis forkuri. Ie ajn. Subite okazis miraklo. Nevidebla forto tenis min. Mi staris enradikiĝinta, rigardis supren al la ĉielo, kaj el mia brusto venis la preĝo: "Ho Alaho, bonvolu purigi min!" Mi ne sciis, kiu estas Alaho, mi ne havis ideon pri Islamo, mia kredo estis Zen-budhismo, mi ankaŭ havis fortajn simpatiojn por kristanismo, estis Biblio en mia pakaĵo. Kaj tamen, en ĉi tiu malespera situacio, mi ne preĝis al Jesuo aŭ al la budhismaj sanktuloj. Sed al Alaho. Ĝi ne okazis ĉar mi volis. Estis ia revelacio. Alia forto pli potenca ol mi parolis per mi. Baldaŭ poste (reen en Germanio), dum mi sidis fronte al la muro antaŭ desegnaĵo uzata por koncentriĝo k meditado, okazis dua miraklo. Kun la kapaŭdiloj surŝaltitaj, mi aŭskultis la solan muzikon kiun mi kredis sankta. Ĝi estis pakistana grupo. Subite, blanka ekbrilo leviĝis de simbolo sur la desegnaĵo kiu signifis OM, kiu estas vorto en hinduismo por Dio. Ĝi pasis super mi kaj mi turnis min, pensante, ke ĝi kondukas al unu el la libroj, kiuj sidas tie en mia libroŝranko. Mi ne rigardis tiujn librojn dum jaroj - mi ne plu loĝis hejme kun mia patrino, sed kie mi loĝis nun estis ĉar mi ne sciis kie alie loĝi. Do mi sekvis la fulmon al mia libroŝranko kaj subite mi vidis Koranon. Mi pensis, ke la signo en la bildo devas havi ion rilaton kun ĉi tiu libro kaj ke la fulmo kondukis al ĉi tiu libro. Do mi prenis la libron, malfermis ĝin ie kaj komencis legi. Mi legis nur kelkajn liniojn, kiam subite evidentiĝis al mi, ke Dio parolas al mi. Ke ĉi tiu libro estis 100% vera. Mi neniam antaŭe havis tian senton. Nek dum legado de la Biblio, nek dum legado de la budhismaj skribaĵoj, nek dum legado de la joga libro. La potenco de la vero, kiun mi legis ĉi tie en la Korano, kaptis min kaj mi pensis nur unu aferon: tio, kio estas skribita ĉi tie, estas vera, ĝi estas la

vero, vi devas akcepti ĝin. Kaj mi diris al mi en la koro: Nun vi estas islamano.”

Tiu ĉi estas emociplena rakonto pri lia konvertiĝo al Islamo kun preskaŭ nekredeblaj hazardoj k mirindaĵoj, rezultante en lia persona kredo ke li finfine trovis la veron. Nu, estas ja same kun ĉiu religio – oni ja devas al ĝi kredi, ĉar ne eblas pruvi la rakonton malantaŭ ĝi. Kaj oni ne forgesu, ke ĉiuj metafizikaj kaj religiaj konjektoj, povas esti klarigitaj psikologie: „Antaŭ ĉio, ili servis por legitimi certajn moralojn” (F. Nietzsche). Sed fakto ankaŭ estas ke nuntempe granda procentaĵo de homoj ne plu praktikas unu ajn religion, almenaŭ ne partoprenas la ofertojn de unu el la tri monoteistaj mondreligioj Islamo, Judismo aŭ Kristanismo. La nuntempa „religio” en la okcidento estas la humanismo, do kredo je la homaro kaj la homaj rajtoj. Sed ankaŭ la nova kredo je humanismo kaj individua memrealiĝo ne solvis niajn internajn konfliktojn, eĉ kaŭzante pli grandajn psikozojn. Nur pli profunda sinscio povas ŝavi nin kaj sekve la homan civilizacion: Ni ja ankoraŭ danĝere malmulte scias pri nia tipa homa kondiĉo. Do, antaŭ krei artefaritan inteligenton aŭ esplori la kosmon ni devus unue esplori la nigran spacon en ni mem – ne nepre per haluciniĝaj drogoj kiel P-G Hübsch, sed komprenante nian kreskantan psikozon kaj tiel liberigi nin de nia necerteco pri ni mem. La nun komencanta advento ja povus doni tempon por kontemplado kaj pripensado kaj por pridemandi nian egoon: Revelacio ne estas privilegio de religiemuloj – ĝi ja povas okazi ĉiutempe kaj ĉiuloke, kaj ne nur sub suda suno en lando Maroko kiel ĝi okazis al P-G "Hadayatullah" Hübsch, eksa imano kaj vendreda ĉefpreĝisto en la Nuur-moskeo en Frankfurto. La anoj de la paroĥa komunumo Ahmadiyya Muslim Jamaat cetere kredas, ke religioj uniĝas en Islamo. Mi citas el vikipedio: „La Ahmadismo instruas, ke Budho, Kriŝno, Abrahamo kaj Jesuo Kristo estis islamaj profetoj, sed per forgeso, manipulado kaj aldonoj disvolviĝis la religioj de budhismo, hinduismo, judismo kaj kristanismo. Ili asertas, ke ili trovis signojn en ĉiuj ĉi tiuj religioj, ke ili atendas la "reformanton" en la "finaj tempoj", kiu estas atendita en Islamo kiel persono de *Mahdi-o*. La kalifo *Mirza Ghulam Ahmad* vidis sin kiel la profetita reveno de Jesuo, Kriŝno kaj Budho en unu persono. *Mirza Ghulam Ahmad* asertis havi la kvalitojn de ĉiuj tiuj profetoj kaj esti aperinta en la spirito kaj potenco de la antaŭaj profetoj. Li volas esti fondinta la Ahmadismo-movadon laŭ dia mandato por ke ĉiuj religioj povu kuniĝi sub la standardo de Islamo, kiu devas esti plenumita ene de 300 jaroj. Tiuj ideoj estas rigardataj en interreligia dialogo parte kiel ensorbaj kaj parte kiel oni komprenas sinkretismon.” – Nekredeble: Kiel ĉiu religia estro li opinias, ke li sole scias la tutan veron !

<https://de.wikipedia.org/wiki/Nuur-Moschee>
https://assets.deutschlandfunk.de/FILE_6ce3252b030b8cdded0d456fa6936b4fd/original.pdf
<http://hadayatullah.de/vita/mein-weg-zum-islam/>
[https://de.wikipedia.org/wiki/Ahmadiyya Muslim Jamaat](https://de.wikipedia.org/wiki/Ahmadiyya_Muslim_Jamaat)

Pri Zamenhoftago kaj nia tielrilata kunveno

De Felmano Ulriko

Ĉi-jare la ESF celebros la Zamenhoftagon jam je la 14-a de decembro, unu tagon antaŭ la naskiĝdatreveno de Zamĉjo, kiu ja estas la 15-a. Kontraste al la lastaj fojoj, ni ĉi-foje okaze de ĝi kunvenos ne en nia klubejo MŬZ (kiu semajnfine ja estas fermita - 14-a/15-a estas sabato kaj dimanĉo) sed meze de la urbo, apud eta parko, la Wiesenhüttenplatz. "Kial?", iuj de vi eble demandos.

Estis la jaro 1904. Tiam okazis pluraj esperantorilataj gravaĵoj:

Unue, estis la jaro de lastaj laboroj pri la eldonota Fundamento de Esperanto.

Due, en 1904 okazis la unua internacia Esperanto-renkontiĝo, kvazaŭ la "nula UK", ofte nomita "la antaŭkongreso" de la unua oficiala kongreso en 1905.

Kaj tria evento gravas tiujare, almenaŭ por ni: en 1904 fondiĝis la Esperanto-Societo Frankfurto, kies unua renkontejo okazis - je la Wiesenhüttenplatz, situanta inter la frankfurtmajna ĉefstacidomo kaj la rivero Majno.

Mi nun aldone kaptas la okazon por iom informi pri la nemulte konata unua internacia kunveno de Esperanto, pri kiu la Vikipedio skribas:

"... kvazaŭ antaŭkongreso [kiu] okazis [en 1904] en Calais [kaj Kembriĝo], kie precipe francoj kaj angloj

Pro tio, mi dum la lasta estrarkunveno proponis, ke ni ĉi-jare, 120 jarojn post la fondiĝo de nia klubo, ankaŭ tie kunvenu, kie nia societo kreiĝis. Kaj ĉiu partoprenontulo antaŭe elektu poemon aŭ teksteton el la Fundamento aŭ el la Fundamenta krestomatio por deklami ĝin dum nia renkontiĝo sur la "placo de gazonaj dometoj", tiel la signifo de la placa nomo.

Kromnote, ke ni renkontos ĉi-foje je sabato estas eble bona koincido, ĉar Zamenhof estis ja judo, se eĉ li ne estis tradicia kredulo (sed la patrino estis, kaj estis pro ŝi, ke Zamenhof flue parolis la jidan, ĉar la patro intence hejme parolis la rusan).

Loko kaj tempo jam estis anoncitaj en antaŭa ei, en nia Telegramkanalo, kaj per retroŝta dissendo, tamen, denove por rememorigo:

Ni renkontos je la placo Wiesenhüttenplatz, kiu situas tre proksime al la frankfurtmajna ĉefstacidomo, je la 11:45-a horo. Post nia deklamado (kaj eble kantado de La Espero) ni iros al restoracio por tie kune tagmanĝi.

kunvenis. Estis eksperimento, ĉu diverslingvaj Esperantistoj reciproke sin komprenas. Ĉar la provo bonege sukcesis, oni decidis kunvoki pli grandstilan kunvenon por proksima jaro en Bulonjo-ĉe-Marco."



<https://arkivo.esperanto-france.org/divers/deligny/evivo4.htm>

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La estro al la sekretariino:

- Kial mi neniam vidas vin laborantan, kiam mi eniras?
- Verŝajne kaŭze de viaj kaŭĉukaj plandumoj.

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

La proverbo kiun mi hodiaŭ prezentas temas pri ornamaĵoj, do en pli vasta senco de „pli ŝajni ol esti“.

Proverbo 731: Eĉ ŝtupo estos bela, se vi ĝin ornamos

Fonto: https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/zam/teme_1217.htm

Poemo "La lunnokto"
de Josefo Libersinjoro de Kverkovilaĝo.
Tradukis Felmano Ulriko

Estis kiel la ĉielo
Silente kisintus la teron,
Ke ŝi, en flora brilo
Pri li revintus nun.

L'aero pasis tra la kampoj,
La spikoj milde svingis,
L'arbaroj kviet-susuris,
La nokt' stelplena is.

Kaj mia animo streĉiĝis
Flugilojn ĝi etendis,
Tra la silentaj landoj,
Kvazaŭ ĝi hejmen flugus.

Joseph Freiherr von Eichendorff



Lasta Paĝo – Provtraduko de la novelo “Advento en la altmontaro”

De Georg Hennemann

Daŭrigo de la novelo “Advento en la altmontaro” de Gunnar Gunnarsson

Kiu ĝis nun okazis: Same kiel en antaŭaj jaroj Benedikto preparis sian adventmigradon tre zorgeme kaj nun ekiris kun lia hundo *Leo* kaj lia virŝafo *Knorc* al la altmontaro, postlasante la ĉevalon *Fakse*, kiu “bedaŭrinde estis tro etpieda kaj peza por tratroti la profundan, malfirman neĝon de la antaŭvintro, kaj cetere ne tro kapabla, tiom multe da lacegaj tagoj elteni kun nur malmulta manĝaĝo, kion la tri aliaj provizore povus.”

Nur kun dolora malĝojo Benedikto kaj *Leo* disiĝis de li, eĉ se nur dum semajno. Kiel ĉio alia, *Knorc* prenis ĉi tiun taskon kun pli granda trankvilo. Tie la *trifolio* vagis tra la vintra tago: Antaŭe estis *Leo*, kiu malgraŭ la malvarmo lasis kontente la langon pendi el la dekstra angulo de la buŝo, malantaŭ li *Knorc* en egala troto, kaj laste Benedikto, kiu trenis la skiojn malantaŭ si. La neĝkovraĵo ĉi tie malsupre en la loĝata lando estis ankoraŭ tro malpeza kaj loza por subteni skiojn; Vi devis paŝi tra la neĝo kaj bati la piedfingrojn kontraŭ la terpecoj de tero kaj ŝtonoj - uf, estis sufiĉe malfacile antaŭeniri, sed krom tio ne estis grava afero. *Leo* estis tre okupata, kiel devus esti hundo, kaj estis en bona humoro. Kelkfoje li ne povis teni sin pli longe kaj devis eksplodi. Tiam li rekuris al Benedikt per sovaĝaj saltoj, tiel ke la neĝo ekblovis ĉirkaŭen, albojis lin, provis grimpi lin kaj postulis, ke oni laŭdu kaj karesu lin. “Jes, ci estas vera Papo,” diris Benedikto; tio estis nun simple lia karesnomo por lia kamarado kaj ne estis pli alta laŭdo el la buŝo de Benedikto.

Por la momento ili vojaĝis tra loĝata lando al *Botn*, la lasta bieno antaŭ la montoj. Ili havis antaŭ si la tutan tagon kaj trankvile prenis ĝin, sekvante la vojetojn de bieno al bieno, haltante kaj salutante homojn kaj hundojn. “Sed tason da kafo...” - “Ne, dankon, ne hodiaŭ...” - ili ŝatus ĝustatempe atingi sian celon. Tiam oni anstataŭe donis al ili gluton da lakto – al ĉiuj tri. Denove kaj denove Benedikt devis doni informojn pri tio, kion li pensis pri la vetero. Oni ja nur pensus, kaj neniukaze volus esti trudema aŭ ludi la profeton de malbonŝanco. Sed unu demando estas ja permesita. Eble ili tiam diris: “Jes, kion mi volis diri, estas ke *Leo* estas hundo, kiu trovas sian vojon - eĉ en la mallumo kaj en neĝoblovoj?”

Homoj diris tion ŝerce, por tiel diri, kaj evitis malfermi la okulojn, evitante, eĉ nur rigardante la minacantajn nubojn en la ĉielo. Kaj tiam rapide trapasis ĝin: “Li povas trovi la vojon, la hundaĉo.” “Ni ĉiuj tri povas fari tion,” Benedikt respondis firme kaj malplenigis sian laktopelvon. “Multan dankon!”

“Krom *Knorc*, mi nun plej fidus je *Leo*,” ŝercis la farmisto, malaperante en la domo por momento por alporti al li regalaĵon, ion por manĝi.

Benedikto nenion diris, io, ke li ja estas vera Papo, sed nur kapjesis al *Leo*, ke li povas preni sian tempon por manĝi, li atendus tiom longe. Dume, *Knorc* ricevis manplenon da bona herbeja fojno. Tiam ili denove ekiris, ili tri.

Benedikto ne estis hodiaŭ en la preĝejo, maltrafis ĝin, ne havis tempon. Se li volus alveni je prudente racia horo kaj sufiĉe ripozi antaŭ la frua foriro kaj la longa marŝo de la sekvanta tago, hodiaŭ devus esti profitata ekde frua mateno. Ĉefe pro *Knorc* li prenis la unuan tagon tiom malmulte streĉa. Bone komprenite: *Knorc* estis en ordo kaj ne portis sian nomon senmerite. Sed vi devis atenti ne trostreĉi lin tuj. Tial Benedikto ne povis preni la ĉirkaŭvojon per la preĝejo. Dum la unua Advento, tiu ĉi migrado tra la kamparo ĝis la rando de la erikejo estas lia preĝejvizito. Krome, antaŭ ol foriri en la ĉambro de la servistoj, li sidis sur la rando de sia lito kaj legis la dimanĉan tekston, Mateo 21, pri la eniro de Jesuo en Jerusalemon. Sed li devis imagi la sonorilojn, la kantadon en la gazona preĝejeto kaj la saĝan, trankvilan interpreton de la evangelio de la maljuna pastro. Ankaŭ tion oni povus fari.

Do nun li marŝis tra la neĝo - blanka ĝis la okulo povis vidi - la vintra ĉielo grizblanka, eĉ la glacio sur la lago frostigita aŭ iomete kovrita de neĝo. Nur la malprofundaj krateroj, kiuj elstaris tie kaj tie el la neĝo, markis la pli grandajn aŭ pli malgrandajn ringojn de siaj funeloj kiel avertan ŝablonon en la neĝa dezerto. Pri kio ili volis rememorigi homojn? Ĉu ĝi povus esti sondita? Eble ĉi tiuj kraterbuŝoj diris: Lasu ĉion frostigi, lasu ŝtonon kaj akvon solidiĝi; Lasu la aeron frostigi kaj mallevi en blankaj flokoj kaj kuŝi super la tero kiel edziĝa vualo, kiel

mortotuko, lasu la spiron frostigi en via buŝo kaj la esperon en via koro, kaj en la morto la sango en viaj vejnoj - tie profunde do estas vivo el fajro. Eble tion ili diris. Kaj kion ili volis diri per tio? Eble ili diris ion alian. Sed ĉiukaze: krom ĉi tiuj nigraj ringoj, ĉio estis blanka, precipe la lago en la valo — brilanta blanka surfaco, glata kiel draŝejo. Por kiu? Kiun li invitis al la danco?

Kaj kiam ĉiuj eliris el tiu ĉi blankeco, en kiu nur la nigraj krateraj ringoj kaj izolitaj fantomaj lavaj kolonoj leviĝis jen kaj jen, konsekro kuŝis ĉi-dimanĉe en la montara distrikto, korprema konsekro. Nemezurebla, senkulpo-blanka solenaĵo ĉirkaŭis la trankvilan fumon de la ripoztago el la vaste disĵetitaj malaltaj kortoj, kiuj preskaŭ

malaperis sub la neĝo, nekomprenbla, nekredeble aŭspicia silento — Advento, Advento. Jes, Benedikto zorge metis en lian buŝon la vorton, ĉi tiun grandan, trankvilan, mirige fremdan kaj tamen samtempe tiel konatan vorton, eble la plej konatan el ĉiuj al Benedikto. Estas vere, ke li ne sciis precize, kion tio signifas, sed estis atendo, preparo, li sentis tion. Tra la jaroj, ĉi tiu vorto fariĝis parto de preskaŭ lia tuta vivo. Ĉar kio estis lia vivo, kio estis la vivo de homoj sur la tero ĉiukaze, krom neperfekta servo, kiu estis subtenita de atendo kaj preparo?

... daŭrigota



Bildo farita de Dall-e <https://de.wikipedia.org/wiki/DALL-E>